

Jacques Mühlethaler, 6-a parto
Claude Gacond, 126-a radioprelego, 1966.03.02 & 1966.03.05

Claude Gacond : Atentu esperantistoj ! Ĉi tie aŭdiĝas Svisa Kurtonda Radiostacio. Parolas Claude Gacond, Andrée Gacond kaj Cosette Giroud.

Ni daŭrigas la rakonton pri la porpaca pilgrimado de Jacques Mühlethaler.

Andrée : Dum la pasintaj elsendoj vi konatiĝis kun tiu ĝenevano, kiu dediĉis sian vivon al la proklamo de la supernacia kaj homarana funkcio de la lernejoj. Hazarde li elektis Turkion por sia unua ŝtatestra renkonto. Lin ricevis la turka ĝenerala sekretario dum longa aŭdienco.

Claude : La morgaŭon nia pacpilgrimanto renkontis alian altrangulon en alia gravega kaj decidiga aŭdienco. Estis la ĝenerala direktoro de la turkia instruado, doktoro Jorukoglu. La eduk-ministro estis bedaŭrinde ĵus demisiinta.

Cosette : Tiu direktoro ŝajnis al Jacques Mühlethaler distancema. Eĉ ne unu muskolo de lia vizaĝo moviĝetis. Lia rigardo absolute nenion esprimis, nek liaj lipoj, kiuj statue seriozis.

Claude : Estas malfacile esprimi sian penson al persono, kiu nenion esprimas. Se oni sentas simpatian, tiam oni entuziasmiĝas ; se oni sentas kontraŭemon, tiam oni plede streĉiĝas. Sed senintereso vekas enuon kaj timon ĉe la parolanto. Jacques Mühlethaler sentis sian langon sekiĝi kaj sian koron angori. Jam dum pli ol duonhoron li paroladas, kaj la aŭdanto ĉiam statuas. Ĉu eĉ li aŭskultas ?

Andrée : Subite ĉio ŝanĝiĝis. La statuo leviĝis, la buŝo esprimis agrablan kaj entuziasman ridegon. La distancema direktoro kaptis la manon de la sviso kaj siavice ekparoladis :

Claude : « *Nenio plu, en la instruado, devus esti entreprenita naci-skale. La lernejoj estas la fandujo de la tuta homaro, kaj tio malgraŭ la ĝenerala apatio. Povu la guberniestroj, la instruistoj kaj ĉiuj, kiuj okupiĝas pri la interpopola alproksimiĝo, povu ili aŭdi vian alvokon kaj agi en ĝian direkton.* »

Cosette : Tiu subita ŝanĝiĝo kaj tiu amika manpremo emociigis Jacques Mühlethaler. Larmoj ekaperis en liaj okuloj.

Andrée : Tiam komenciĝis longa kaj konstruiga konversacio. Konversacio decidiga por nia ĝenevano.

Claude : « *Mi ŝatas la manieron, per kiu vi kapablis substreki la homaranan rolon de la lernejoj, diris la direktoro Jorukoglu. Sed oni rajtas atendi ankoraŭ pli de vi. Vi devas iri pli foren, multe pli foren. Vi devas skribi. Skribi por precizigi vian penson, por igi ĝin pli komprenebla al la vasta publiko kaj pli preciza al la fakularo. Vi devas trovi rimedon por popularigi vian alvokon por tuŝi ne nur la altrangulojn, sed la popolamason kaj la instruistaron. Vi nepre devas skribi.* »

Cosette : Jacques Mühlethaler respondis, ke li ne sentis sin jam sufiĉe matura por tiu laboro.

Andrée : La direktoro tiam ridetis kaj aldonis :

Claude : « *Trovu verk-helpantojn. La kaŭzo, kiun vi defendas, estas multe tro grava, por ke sentu pri nekapablo vin paralizigu. La verkado permesos al vi konversacion kun vi mem, babiladon kun viaj ideoj. Baldaŭ vi povos kristaligi vian idealon ĉirkaŭ io. Vi devas malkovri rimedon, kiu konkretigos vian kampanjon. Tiam vi pli facile povos advokati la supernacian funkcion de la instruado antaŭ la pedagogoj, guberniestroj kaj edukministroj. Jen kion ebligas via libro. Verku ĝin!* »

Cosette°: - Kaj mi trovis lin statue rigida! pensis Jacques Mühlethaler, aŭskultante liajn pravajn konsilojn.

Jacques Mühlethaler, 6-a parto
Claude Gacond, 126-a radioprelego, 1966.03.02 & 1966.03.05

Andrée : Post pli ol unu horo da diskutado pri tiu problemo kaj pri la turka lerneja situacio kaj Mevlana, la granda poeto de la turkoj, la fondinto de la derviŝa mahometana mond-kompreno, Jacques Mühlethaler leviĝis por dankegi tiun eksterordinaran aŭdienc-donanton.

Claude : « *Via entuziasmo kaj esprim-kapablo nur povas min firmigi en mia unua impresio, ankoraŭ eldiris la direktoro. Vi devas plej rapide ekverki. El tio nur fine naskiĝos io klara, konstruiga kaj facile komprenebla. Mi sentas vin spirite eksterordinare libera. »*

Cosette : Li ankoraŭ donis sian privatan telefonnumeron, dezirante esti regule informata pri la sukcesoj aŭ malsukcesoj de la aliaj kontaktoj.

Claude : Elirante tiun domon nia ĝenevano sentis sin ne nur kuraĝigita por la daŭrigo de la entreprenita kampanjo. Li pli klare pensis sian estontan agadon. Elektinte Turkion li pravis. En tiu lando oni ne nur aŭskultas lin. Oni sin montras helpema.

Andrée : Tion li denove sentis la morgaŭon dum ĵurnalista konferenco, kie, se la publiko ne abundis, tamen almenaŭ la informemo grandis.

Claude : Konklude : Jen unua bona labor-semajno. Por ĝin festi Jacques Mühlethaler veturis la dimanĉon al Konja, la urbo de la poeto Mevlana, pri kiu rakontis la direktoro Jorukoglu.

Triope: Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond, Andrée Gacond kaj Cosette Giroud diras al vi : Ĝis reaŭdo !

-oOo-